

HÉROUVILLE-ESPÉRANTO

Maison des associations - 10-18, Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint-Clair - esperanto.herouville.14200@gmail.com



Magazine édité par l'association Hérouville-Espéranto - Maison des associations - 10-18 Le Grand Parc - 14200 Hérouville Saint-Clair
Directeur de la publication : Bertrand Verstraete - Korektis : Françoise Noireau - Imprimé par nos soins - Dépôt légal mars 2026 - ISSN 2648-3203 - Prix : gratuit.
Deponita ĉe Bibliothèque Nationale de France, Österreichische Nationalbibliothek (Vieno, Aŭstrio)
Archives départementales du Calvados, Fonds Normand de la Médiathèque Alexis de Tocqueville (Caen), Bibliothèque de Cherbourg,

NORMANDA ESPERANTO-BULTENO



NUMÉRO SPÉCIAL CONGRÈS D'ESPÉRANTO-FRANCE



Enhavo

Kluba vivo.....	2 & 3
La literatura paĝo.....	4
La centvorta mikronovelo.....	4
10 specialaj kongeresaj paĝoj	5-15
La memorturisma paĝo	16
La kiurarta paĝo	17
Someraj ludoj.....	18-20
Staĝu, kongresu.....	21

n-ro 295- a
Somero 2026

TROIS DATES À RETENIR

SA. 05.09

Fête des associations

MA. 15.09

Reprise des rencontres hebdomadaires

SA. 10.10

Assemblée générale annuelle

EKSKURSO KAJ MANĜO EN BRICQUEBEC

8/8

Une petite sortie estivale, ça vous dit ?

Le **8 août**, nous vous proposons **une journée à Bricquebec**.

Proposition de programme (à discuter) : **visite de la ville, repas au restaurant avec les espérantistes de la Manche, promenade digestive à Rocheville** dans un bois plein de loups-garous et goubelins !

Et bien sûr... convivialité !

Bienvenue à tous, notamment aux anciens d'Espéranto-Normandie qu'on espère nombreux !

Simple : On covoiture et chacun paye son repas - **Inscriptions**

Bertrand.Verstraete@tutanota.de

COURS D'ESPÉRANTO À L'ANTENNE DE CHERBOURG DE L'UNIVERSITÉ INTER-ÂGES DE NORMANDIE



À la rentrée universitaire 2026-2027, un cours d'espéranto sera proposé par l'antenne de Cherbourg de l'Université Inter-Âges de Normandie, assuré par Marco Teani.

Lieu des cours : IUT de Cherbourg-Octeville, 2 rue Max Pol Fouchet.

Dates et horaire des cours :

- de 10 h. 30 à 12 h. 00,
- les mercredis 7 octobre, 04 et 18 novembre, 02 et 16 décembre, 06 et 20 janvier, 03 et 17 février, 17 et 31 mars, 14 avril, 12 et 26 mai.

Renseignements et inscriptions :

- uia.cherbourg@unicaen.fr
- 02 33 01 46 66 - 07 85 93 42 32



Pas encore espérantiste ? Rejoignez-nous !

Nos cours reprendront le 15 septembre et se déroulent chaque mardi (hors vacances scolaires) de 17 heures 30 à 19 heures 00 à la Maison des Associations 10.18 Le Grand Parc à Hérouville Saint-Clair.

Vous n'êtes pas disponible à ce moment-là ? Inscrivez-vous au cours en ligne gratuit I-Kurso. Un correcteur vous sera attribué qui accompagnera votre progression au long des 10 leçons que vous suivrez à votre rythme jusqu'à recevoir votre attestation de formation.

Renseignements : esperanto.herouville.14200@gmail.com

+336 09 42 10 06



INFORMO

La ĝenerala kunsido decidis, la 9an de junio ne ŝanĝi la prezojn de la venontjara kotizo. Aliĝu ekde la 1a de Oktobro ĉe la retejo de Esperanto-France aŭ ĉe la kasisto de nia klubo la 10an de oktobro okaze de la venonta jarĉefkunsido.

La kotizoj por la klubajaro 2026-2027 estos akceptataj de la 1a de oktobro 2026 kaj validos ĝis la 30a de septembro 2027.



Listo de la kotizintoj 2025-2026. Aliĝis al nia klubo 33 membroj. Ĉu vi?

Brunet V., Cagnard C., Caron-Liray S., Charles V., Colbert J., Cottin B., Dalibert F., Danel K., Danel J., Daufrene B., Dion C., Dufeu P., Duflot M., Dufresnes B., Ferrand C., Fortin F., Fortin J.-M., Hardel E., Langeois M., Lemarié S., Lemeltier M., Leprévost A.-M., Marlier-Riquier C., Plantade F., Rouget C., Sauvage J.-P., Sénécal Gé., Sénécal Gi., Tarlevé B., Reani M., Troisgros R., Verstraete B., Verstraete V.



Samkiel en en la bilstrioj Asteriks finiĝis tiu ĉi riĉa klubajaro per kuna amika bankedo.

La 16-an de Junio, en sia ĝardeno bonvenigis nin Cora. Ni tamen ne ŝnuris bardon en arbo nek manĝis rostitajn apraĵojn ĉirkaŭ ĝojfajro: ĉiuj alportis pladojn ĉu salitajn ĉu sukerajn, kiujn ni kundividis en frata etoso.

Kompreneble, Gigi afable preparis laŭtradicie la bakitan normandan rizon, la faman "teurgoule".



Podkasto pri la libro de Thomas Creusot.

Dum la kongreso, kadre de la prelegserio pri la pioniraj tempoj de Esperanto prelegis **Thomas Creusot** pri la komencoj de la internacia lingvo en Francio, komence de la 20a jarcento.

Fine de junio, li **registros (en la franca) podkaston pri sia libro, kiu poste disponeblas ĉe la jutuba kanalo "Quoi de neuf en histoire ?"**

https://www.youtube.com/@qdneh_podcast/videos.



Hotelo Paradizo. Gérard Sénécal.

Novelaro

ISBN : 978-2-9599130-1-3

140 paĝoj - 13 X 22 cm

Éditions Hérouville-Espéranto, marto 2026

1975. En Koronios, la konstruata hotelo Paradizo de la greka masonisto Dimitrios Kostantinidos akceptas la francan familion Portal, siajn unuajn klientojn. Bebo, poste knabineto, la juna Milena Kostantinidos travivas feliĉajn tagojn.

Plurajn jarojn poste, la japana studanto Takeŝi Kanamori, neatendite vojaĝas al Grekio kun iu S-ro Bernard Portal. Tiu ĉi deziras revidi hotelon en kiu li feris, kiam li estis infano. Ŝajnas, ke ĝi estas de longe fermita!

2015. En hospitalo, Bernard Portal ne kredas tion, kion li vidas! La flegistino, kiu zorgas pri li ... Ĉu ŝi eble estus Milena, la filino de la greka masonisto?

12€

ALKLAKU ĈI TIE POR MENDI

aŭ sekvu tiun ligilon

<https://tinyurl.com/Libroservo>



LA ĈI-TRIMESTRA CENTVORTA MIKRONOVELO

La ĉi-trimestra centvorta mikronovelo. Sendu la vian al esperanto.herouville.14200@gmail.com

Alhajmera malapero. Dediĉita al l'amiko Torben.

Verkis
Bertrano el Ĵibervil'

Apogante sin sur marŝbastono, la dorso klinita, malforta lamanta kadukulo sole vagadas sencele tra silentaj stratoj de dezerta urbeto.

Kien li direktiĝas? Verdire, li ne scias.

Tagon post tago, liaj rememoroj nehaltigeble vaporiĝas.

Pene li paŝas, senkiale tamen sentas sin neklarigeble leĝera, spektra.

Instinkte, li haltiĝas ĉe malnova domo, kies fenestroj, kvazaŭ spegulo, reflektas nebulan fantomaspektan ombron. Li alproksimiĝas. Simetrie alproksimiĝas vizaĝo. Ŝajnas al li, ke li jam vidis ĝin. Kiam? Kie? Sensukcese li klopodas rekoni ĝin.

Li etendas la manon. Simetrie klopodas nekaptebla aperaĵo ekkaresi lin.

Tra la vualo de liaj larmoj malaperas la fantomo ... La fantomo de lia vivo.

De la 22a ĝis la 26a de majo, okaze de la kongreso de Espéranto-France. nia klubo bonvenigis en Hérrouville Saint-Clair 129 homojn el Francio sed ankaŭ el 7 aliaj landoj: Danio, Britio, Kebekio, Belgio, Luksemburgio, Italio kaj Aŭstralio.

Antaŭ longe, komence de la pasinta jarcento, kelkaj britaj esperantistoj transiris la Manikan Markolon por renkonti la normandajn samideanojn en Havro. Edmond Privat vidis tiun ĉi unuan renkontiĝon kiel la genezon de la estontaj kongresoj.

Normandio jam bonvenigis kongresojn. En 1930, la 27a kongreso de la Societo por la Disvastigo de Esperanto okazis en Havro, sekvita en 1965 de la 57-a kongreso de la Unuiĝo Franca por Esperanto, kies 80a kongreso okazis en Rueno en 1988.

SPFE, UFE, hodiaŭ Espéranto-France. Ŝanĝiĝis la nomo de nia asocio, alvenis nova jarcento, pasis preskaŭ 40 jaroj sed daŭras nia ĝojo bonvenigi samideanojn sub la famega normanda suno.

En Hérrouville mem neniam okazis kongreso de Espéranto-France sed nia klubo organizis tiun de SAT-Amikaro en 1993, laŭ la iniciato de nia karmemora Yves Nicolas al kiu ni volas dediĉi tiun ĉi kongreson.

Nia klubo klopodis proponi programon kiel eble plej riĉan, kaj Esperantan kaj Normandan.

Jen kelkaj rememoroj.

Antaŭ-kongreso: universitata kolokvo: Matematiko kaj Esperanto.


Vendredon, kune kun la Regiona Instituto pri Instruado de Matematiko (IREM-Normandie), estis organizita tuttaga universitata kolokvo pri La historiaj rilatoj inter matematiko kaj Esperanto.

Prelegis nia samklubano François Plantade, kiu organizis kaj kunordigis la eventon, Laurent Mazliak (Sorbonne Université), Rémi Blondel (Université de Lorraine), Frédéric Métin (Université de Dijon), kaj la akademianoj François Lo Jacamo kaj Marc Bavant.



Ludosesio proponita de Espéranto-Vendée

Vespere, en la kafeterio de la kinejo "Café des Images", okazis vespereventoj malfermitaj al la ekstera kaj herouvila loĝantaro. La vendeaj esperantistoj proponis ludojn. Partoprenis lernantoj el la apuda lernejo kiuj, instruitaj de François, scipovas nombri kaj kalkuli en Esperanto.



Ankaŭ malfermita al la loka loĝantaro estis la prezento de la filmo de Gabin Forcier *Esperante Eŭropon*, projekciita en la kinejo de la urbo. La malgranda ĉambro Tati estis plenplena! Sekvis tre interesa debato parte en la franca, parte en Esperanto inter Gabin kaj la publiko.



Fotis Xavier Godivier



Fotis Emmanuelle Richard

Bonvenigo de la kongresanoj malfermo de la kongreso

Bertrand, nome de la LKK bonvenigis ĉiujn kaj dankis al la komunumo, kiu multe helpis al la organizado de la kongreso kaj disponigis la kongresejojn (Teatron L'Atelier kaj Pôle Animation et Jeunesse).

Siavice bonvenigis la kongresanojn la vicurbestrino pri la internaciaj rilatoj. Tiukaze, ŝi ĉe diris kelkajn vortojn en Esperanto !

Fine paroladis la prezidanto de Espéranto-France: Xavier oficiale malfermis la kongreson kaj, post paŭzo, prezidis la jarĉefkunsidon de nia asocio.



Fotis Thierry Spanjaard



Fotis Benoît Ente



Fotis Thierry Spanjaard



Fotis Bertrand Verstraete



Fotis Michèle Langeois

Jarĉefkunsido

La membroj de la asocio laŭ la statutoj aprobis la jarajn agadraporton kaj finanĉan raporton kaj elektis la novajn komitatanojn.



Fotis Michèle Langeois

Fotis Rémi Troïgros

Libroservo kaj kursoj

Ne ĉiuj membroj povis partopreni en la jarĉefkunsido: kelkaj estis devigitaj doni prokuron ĉar samtempe jam malfermiĝis la libroservo kaj jam komencis la du kursoj de Chantal Allen (por komencantoj kaj komencintoj) kaj Elisabeth Le Dru (por progresantoj).



Fotis Bertrand Verstraete



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois

Interregiona konatiga manĝo.

Post tia laboro, ekmalŝatis la kongresanoj. Estis tempo por la interregiona konatiga manĝo proponita en kroma ĉambro, kelkajn centmetrojn for. Ĉiu kunportis tipan pladon el sia regiono. Eĉ la aŭstralianoj kunportis manĝaĵon el sia lando! Kompreneble, la normandoj proponis... fromaĝon, cidron kaj teurgoule.



Fotis Michèle Langeois



Fotis Rémi Troisgros



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Rémi Troisgros

La prelegoj pri la pioniroj

Dum la kongreso, tri prelegoj estis proponitaj pri la historio de Esperanto.

Tim Owen el Britio prelegis pri **Harold Bolingroke Mudie, la unua prezidanto de UEA**, kiu forpasis en Normandio dum la Unua Mondmilito kaj estas entombigita en la urbo Forges-les-Eaux (Eure).



Vinko Markovo prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT prelegis pri ĝia fondinto Eugène Adam, alinome Eugène Lanti, kiu naskiĝis en la normanda vilaĝo Néhou (Manche)



Notinde estas, ke nia samklubano Georges Montaigu tradukis al la franca verkojn de Lanti kaj verkis lian biografion. **Eugène Lanti, rencontre avec un citoyen du monde, traduit et commenté par Georges Montaigu, éd. Thadée (25 €).**

Prelegis en la franca **Thomas Creusot**. La paleografisto de la BnF prezentis sian libron **Esperanto et espérantisme, l'utopie en pratique**. Li malkovrigis la komencojn de la internacia lingvo en Francio tra studado de la tiamaj libroj kaj revuoj, inter kiuj la Normanda Stelo kiu antaŭis nian Normanda-n Esperanto-Bulteno-n.



La prelegoj pri Normandio

Aliaj prelegoj temis pri Normandio el turisma vidpunkto.

Christian Bertin prelegis pri la **Monteto Sankta Mikaelo**, pri kiu li verkis tre interesan kaj spertan libron.

Gigi Sénécal malkovrigis al la aŭskultaro la sekretojn de la **Tapiŝo de Bayeux**.

Thierry Spanjaard prelegis pri la famaj **normandaj fromaĝoj** kaj proponis gustumadon. La fromaĝoj estis donaco de la produktantoj.



Pri niaj nordaj amikoj

Renée Triolle prelegis pri la festivalo **Borealoj** (Les Boréales), kiu ĉiujare kunigas multajn homojn ĉirkaŭ la kulturo de la skandinavaj landoj.

Sekvis la projekcio de **Patrinoj**, origine filmita en Esperanto. Post la spektado de la filmo, ni perrete debatis kun ĝia fina reĝisorino **Anna Andersson**, kun la helpo de **Jouko Lindstedt**, kiu afable tradukis al kaj el la finna.



Ekskursoj estis proponitaj...



Al Caen (1 Nekonata fotisto), al Parko Ornavik (2, 3, 4 M. Langeois), per biciklo al la maro laŭ la kanalo, (5 B. Flochon, 6 M. Langeois), al la naturista plaĝo La Redoute (7 B. Flochon, 8 T. Spanjaard), tra Hérouville, nova urbo kun la asocio Hérouville-Mémoire (9 B. Verstraete).

Koncertoj

Sabaton koncertis en Esperanto la normanda kantisto Armel Amiot. Li por la unua fojo malkovrigis la kanzonojn el “Revivi” sia baldaŭ disponebla nova disko.



Fotis Michèle Langeois



Fotis Bertrano Verstraete



Fotis Bertrano Verstraete



Dimanĉon, koncertis Cap Ouest. La grupo kantis laborkanzonojn, kiujn ili lernis de maljunaj normandajn maristojn.



Fotis Bertrano Verstraete



Fotis Bertrano Verstraete



Dankon al Cédric la tehnikisto!

Aliaj komunikaĵoj

Peter Weide, el Danio, prezentis sian **unulingvan instrumentodon per bildprezentado**.
Notinde estas, ke li verkis **"Ma petite grammaire d'espéranto"** (6,00 € - disponeblas ĉe **Espéranto-France**).



Claudie Demongeot klarigis kiel Esperanto povas fariĝi taŭga rimedo por plifortigi memfidon.



Marĝene de la kongreso, **Benoit Ente** kuncelebris plurlingvan meson (inkluzive de Esperanto) en la apuda preĝejo de la urbo.



Bernard Bigonnet kantigis la kantemulojn.



Fotis Michèle Langeois



Saïd Baluĉi, Laure Patas d'Illiers kaj Gérard Sénécal prezentis siajn freŝe eldonitajn librojn. Siaflanke, **Emmanuelle Richard** prezentis **Espéranto-France Eldonejo**.



La plejparto de la kongresanoj festenis dimanĉon en la Cité de l'Alimentation. Tipaj normandaj pladoj estis proponitaj. Kelkaj kongresanoj helpis la profesiajn kuiristojn prepari la manĝon.



Fotis Bruno Flochon



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Michèle Langeois



Fotis Thierry Spanjaard

Fotis Bruno Flochon



Fotis Bruno Flochon



Fotis Michèle Langeois

Antaŭ la fermo de la normanda kongreso estis anoncataj la venontaj eventoj.



Jannick kaj Bert anoncis la venontajn greziljonajn staĝojn kaj klarigis pri la projektoj de la Kulturdomo..



El Brazilio, Fernando Maia partoprenis per Zoom kaj prezentis la venontan kongreson de UEA. Siaflanke Vinko Markovo prezentis la SAT-an. Noël Reyssset kaj Muriel Caré reklamis pri la Estivales de Plouezek.



Finfine Thierry prezentis la 2027-an kongreson de Espéranto-France en Canny-le-Rouet.

Estu dankataj ĉiuj, kiuj laboris en la ombro aŭ en la lumo por organizi la kongreson :



Adèle, Agnès et la commune d'Hérouville Saint-Clair, ses élus et ses personnels, Anna, Anne-Fabienne et Bertrand T., Armel et ses musiciens, l'association Hérouville Mémoire, Benoît, Bernard, Bert, Brigitte, Maryvonne et Bruno, Chantal, Christian.B, Claude, Claudie, Cora et Jean-Baptiste, Didier et toute l'équipe de la Cité de l'Alimentation, Elisabeth et Denis H., Elisabeth L., Élise et le Café des Images, Emmanuelle, Espéranto-Vendée, Fernando, Francine et Jean-Marie, François L.J., François P., Françoise, Frédéric, Gabin, Gigi et Gérard, Janick, Jouko, Laure, Laurent M., Laurent et ses comparses de Cap Ouest, Marc, Marcel, Marco, Marie-Laure, Martine et Christian M., Michèle, Monique, Nicole et la Maison des Canadiens, Noël, les équipes du Parc Ornavik, Patrice, Peter, Pierre, le Pôle Animation Jeunesse, Raouf et Cédric de l'Atelier, Raymonde, Régis, Rémi B., Rémi T., Renée, Saïd, Sébastien, Simon, Sophie et la Maison des Associations, Sylvie, Thierry, Thomas, Tim, Twisto, l'Université de Caen Normandie et l'IREM de Normandie, Véronique et Bertano V., Véronique.C, Viktoro, Vinko, Xavier... et bien d'autres...

Dum la postkongresa ekskurso laŭ la plaĝoj de la Elŝipiĝo, ni malkovris kiel homoj de multaj landoj elŝipiĝinte sur la normadajn plaĝojn liberigis Francion.

Ni vizitis **Ponto-n Pegasus** (1) malkovris kiel **Bill Millin** (2) kornemuzis meze de la batalo, vidis la **monumentojn al la norvegaj kaj al la polaj maristoj** (3). Ni vizitis la **Maison des Canadiens** (4 & 5), la unua domo liberigita la 6-an de junio far la elŝipiĝintoj. Ĉiĉeronis Nicole, la proprianto. Ni poste direktiĝis al **Arromanches** kaj vidis en la malproksino la artefaritan havenon Mulberry. Ni manĝis mitulojn kun fritojn en la urbo (6) kaj promenis tra de la **germana bateriarejo de Longues-sur-Mer** (7). Ni finfine malkovris la impresan **milittombejon de Colleville-sur-Mer** (8 & 9), kie estas entombitaj preskaŭ 10.000 usonaj soldatoj! Por tiuj, kiuj ne povis partopreni en tiu ĉi postkongresa ekskurso, ni publikigos felietone la tekstojn preparitajn de Sylvie Caron-Liray por prezenti la lokojn en kiuj ni haltis. La unuan epizodon pri Ponto Pegasus vi trovos sekvantan paĝon.



1 - Fotis Jean-Marie Lot



2 - Fotis Cora Dion



3 - Fotis Cora Dion



4 - Fotis Cora Dion



5 - Fotis Cora Dion



6 - Fotis Cora Dion



7 - Fotis Cora Dion



8 - Fotis Bernard Bigonet



9 - Fotis Cora Dion

Ponto Pegasus.

“Unu el la plej aŭdacaj operacoj de la milito” (W. Churchill).

Verkis Sylvie Caron-Liray
el Havro

La plej fama misio de la 6a Brita aeroportita divizio estis la kapto de la levponto de Bénouville kaj de la ĝirponto de Ranville.

La 180 soldatoj de la regimento (Oxfordshire and Buckingham Shire Light Infantry) komandita de la batalionestro Johnn Howard surteriĝis borde de Horsa-j glisiloj apud la ponto je noktomezo.

La operacio kode anoncita per la mesaĝo “Ham and Jam” estis sukcesa. La soldatoj atendis la helpotaĉmenton, la verdĉapulojn de Lord Lovat, inter kiuj estis la 177 francoj de la ataktaĉmento Kieffer, kiuj elŝipiĝis la unuaj.

La intakteco de la Pegasus Bridge estis nepra por grupigo kun trupanoj alvenintaj sur la strandojn de Ouistreham, kaj por ke la liberigantoj fine atingu Caen.

La 26an de Junio 1944 la ponto sur la kanalo de Caen iĝis Pegasus Bridge omaĝe al la britaj soldatoj, kiuj kaptis ĝin: sur la maniko de ilia uniformo estis insigno Pegazo, la flugilhava ĉevalo. Tiu insigno estis elektita de Daphnée du Maurier, edzino de Genralo Browning, kiu estris ĉiujn britajn aeroportitajn trupojn dum la milito.

La ponto iĝis fama danke al la famega filmo “La Plej Longa Tago”.

Pegasus Bridge estis anstataŭita en 1994 de nova ponto. La originala ankoraŭ videbla kuŝas nun en la parko de la memor-monument.

Ponto Pegasus

Café Gondrée

Café Gondrée

Café Gondrée lokiĝas piede de la ponto de Bénouville. Ĝi estas konsiderata kiel la unua liberigita domo post la Elŝipiĝo. La gepatroj Gondrée estis rezistadanoj. Li scipovis la anglan, ŝi estis flegistino. Antaŭ la Elŝipiĝo, ili estis informitaj pri la okazontaĵo.

Preskaŭ je noktomezo, krakoj aŭdiĝis. La liberigantoj de la 6a aeroportita divizio aperis. Baldaŭ du kuracistoj kaj ilia gastigantino zorgis pri la vunditoj. Tiuj ĉi paraŝutistoj celis kunigi kun la 7a bataliono de paraŝutistoj, okupacii la pontojn kaj peli la germanojn for de la vilaĝo. La britaj pioniaranoj instalas pontojn Bailey por havigi rapidan vojon kaj malobstrukcii la padegojn.

La brita pioniraro restis surloke ĝis Aŭgusto.

Jam je la unua datreveno kunvenigis en la tombejo de Ranville vidvinoj de soldatoj kaj stabestroj (Gale, Montgomery).

Post la forpaso de sia patrino, en 1984, Arlette iĝis estrino de la kafejo kaj gastigas daŭre veteranoj.

Kafejo Gondrée iĝis historia domo, kiu daŭrigas la memoroj al veteranoj.



Majoro John Howard kaj Leŭtenanto David Wood en la kompanio de Georges Gondrée, ĝuante sian revenon al la kafejo en 1946.



Okaze de la kongresa normanda festeno, la kuiristoj de la Cité de l'Alimentation preparis tipan normandan pladon: Poulet Vallé d'Auge. Jen la recepto de ĉi tiu tradicia plado, kie la gustoj ekvilibriĝas kaj riĉigas unu la alian.

"Poulet Vallée d'Auge"

Ingrediencoj:

- 1 liberaŝteja kokido
- 2 pomoj
- 2 ŝalotoj
- 1 karoto
- 1 poreo (nur la blanka parto)
- 100g butero
- 5cl maturiĝinta kalvadoso
- 20cl seka cidro
- 1 kondimenta bukedo
- 200g fungoj de Parizo
- 2 ovoŝlavo
- 20cl kremo freŝa
- Salo kaj pipro



Recepto

- Tranĉu la kokidon en pecojn.
- Senŝeligu kaj fajne haku la ŝalotojn kaj karotojn. Tranĉu la blankan parton de la poreo.
- Lavu kaj tranĉu la fungojn, flankenmetu ilin.
- En kaserolo, fandu 50g da butero. Brunigu la kokidajn pecojn, poste aldonu la ŝalotojn, karotojn kaj poreon.
- Verŝu la kalvadoson kaj flamumu. Aldonu la cidron, la kondimentan bukedon, kaj kuiru, kovrite, je malalta varmo dum 50 minutoj.
- En kaserolo, kuiru la fungojn en butero, kovrite. Verŝu la akvon kaj flankenmetu.
- Lavu la pomojn, tranĉu ilin en kvar partojn kaj forigu la kernojn. En pato, rostu ilin en 10g da oleo super meza fajro ĝis ili iomete bruniĝos kaj karameliĝos (ĉirkaŭ 5 minutoj). Flankenmetu ilin.
- Forigu la kokidajn pecojn kaj tenu ilin varmaj.
- En bovlo, kirlu kune la ovoŝlavojn kaj la freŝan kremon, poste filtru la kokidajn kuirsukojn tra fajna kribriilo. Spicu laŭguste.
- Por servi, aranĝu la kokidon sur varma plado kun la fungoj kaj la pomoj. Kovru per la saŭco.
- Vi povas akompani la kokidon kun terpomoj, rizo aŭ verdaj fazeoloj.
- Laŭtradicie, servu prefere kun seka cidro aŭ kun seka blanka vino.

Jindřiška Drahotová, leganto el Ĉeĥia respubliko sendis recepton de marmelado.

Restis al vi bananoj? Plenaj de vitaminoj kaj mineraloj?

Sed ili estas tro maturaj, dolĉaj, aromaj? Sed ili jam gustas iel farume?

Faru marmeladon! Ĝi estas facile farita, sed tre bona.

Kilogramon da bananoj ni senŝeligos, distranĉos. Ni aldonos unu litron da akvo kaj kuiras ĝis kaĉo. Nun ni aldonos 750 g da sukero, sukcon el unu citrono. (Ni povas anstataŭe aldoni sukcon el oranĝo) kaj duonon da kulereto de disbatita (muelita) kariofilo. Plu ni kuiras, ĝis sukero bone degelas. Fine ni enmetos unu decilitron da rumo kaj ne kuiras plu. La konfitaĵo estas preta.



La vortoj kaŝiĝas horizontale, vertikale aŭ diagonale.


Pri Eugène Lanti.

- ## KIE KAŠIGIS HAROLD BOLINGBROKE MUDIE?

Kašis sin Harold Boligbroke Mudie.

Či vu kapablos retrovi lin?

Kiom da kvinpintaj esperantistaj
steloj kaŝiĝas en la desegno?



👉 8?
👉 10?
👉 12?



P



t

'




1



2



n



φ



.

Rébus (en français)

Ĉu vi kapablos solvi tiun ĉi rebuson?

SOLVO:
L'espéranto est une langue internationale
juste et efficace.

A cluster of 10 stars, 5 red and 5 green, arranged in a circular pattern. A hand icon points to the number 10.

 **10**

[illegible]

Venontaj eventoj en Greziljono

- **6a - 15a de Julio:** Maratona Esperanto-kursaro kun Koutny Ilona, Frank Lappe, Marion Quenut
- **6a - 15a de Julio:** 38-a Internacia E-Konferenco post OSIEK pri variaj temoj
- **11a de Julio:** Tutmonda KER-ekzameno, skriba parto, kun edukado.net
- **21a - 30a de Julio:** Interŝanĝoj de scioj kaj faroj (franclingve)
- **1a de Aŭgusto:** Movada Foiro dum UK en Graco
- **10a - 14a de Aŭgusto:** 1-a LSG-renkontiĝo kun Fieraj.org
- **14a - 20a de Aŭgusto:** 7-a Verda Naturisma Semajno kun E-kurso kun INOE
- **20a - 27a de Aŭgusto:** 15-a Festa Semajno por infanoj kaj familioj kun E-kursoj
- **11a - 13a de Septembro:** Tango de Mil kaj Unu Noktoj - franclingve

→  **Pli da informoj:** <https://gresillon.org/rubrique2.html>



León Hispanujo
19a - 26a de Julio



De la 21a ĝis la 23a de aŭgusto: les Estivales de Plouézec

3 jours de fête, de chants, de danses, de conférences et d'activités en Esperanto.

Pli da informoj: reyssetplouezec@hotmail.fr - 07 83 10 83 68

 <http://www.plouezek-armor-esperanto.net>



Esper-Ori invitas ĉiujn partopreni en sia **1an Kongreson.**

Ĝi okazos de la **23a ĝis la 30a de Oktobro** en la Domo de Internaciaj Rilatoj en **Monpeliero.**

En la programo: atentokaptaj prelegoj, atelieroj, kursoj pri esperanto kaj origamio, ekspozicioj, koncertoj, spektakloj, ekskursoj, diskutado pri la rolo de origamio kaj Esperanto en pedagogio, art-terapiio, internacia komunikado, kaj aliaj temoj.

Pli da informoj: association Animation Création Culture Origami
Larysa.Osadchuk-accorigami@gmail.com